

Leterujo : 5-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 482, 1973.01.03 & 06

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andree Gacond.

Komence de nia unua prelego 1973-a bondeziroj ni esprimas al vi ĉiuj, karaj geaŭdantoj. Tiu nova jaro vidu progresi nian komunan celadon : interpopola kompreniĝo pere de disvastiĝo de la zamenhofa lingvo.

A.- En decembro ni malfermis nian leterujon, kie troviĝis leteroj kaj poŝtkartoj el 28 landoj kaj 5 kontinentoj. Laŭ la alfabeto vico de la landoj ni komencis saluti niajn geaŭdantojn, citante el la plej interesaj leteroj kaj malfermante babiladon pri plej diversaj temoj. Tiuj elsendoj celadas interkonatiĝon pere de la radio-ondoj.

Cl.- En Germanio okcidenta ni jam salutis geaŭdantojn. Ni ankoraŭ salutas sinjoron Anton Weber en Wasserburg ĉe Inn kaj sinjoron Bruno Siegert, kiu vivas en hejmo por maljunuloj en Fürth. 79-jaraĝa li aŭskultadas jam de pli ol 20 jaroj niajn radio-prelegojn same kiel la germanlingvaj elsendoj de Svisa Radio.

A.- En Germanio orienta ni havas alian maljunan aŭdanton : sinjoro Franz Tischer, kiu estas 77-jaraĝa kaj bedaŭrinde preskaŭ blinda. Li tamen tajpe skribas al ni amikajn salutvortojn. Plurfoje ni sendis al li informilojn aŭ aliajn dokumentojn, sed vane. Kiel tio okazas en kelkaj orienteŭropaj landoj, niaj sendaĵoj estis haltigitaj de la dogano. Ni ne povas kompreni la kaŭzojn de tiuj doganaj malhelpoj, sed ve, tiel estas. Sinjoro Franz Tischer ne restis pasiva. Li plendadis, kaj nun ŝajnas, ke li venkis la stultecon de la dogana burokratismo. Aŭdu lian luktadon konceme esperantaĵon :

Cl.- *«Antaŭ jaroj tiu doganejo konfiskis al mi jarlibron de UEA, mi nur ricevis la konfiskoprotokolon. Mi tuj kaj akre protestis. Mi eĉ jam persone estis en tiu oficejo, kiu per siaj fiagoj eĉ malbonfamigis Germanan Demokratian Respublikon. Sed tamen mi tiam ricevis tiun konfisk-protokolon. Mi minacis al tiu oficejo, ke se mi ne baldaŭ ricevos de la doganejo la konfiskitan libron, mi sendos la protokolon rekte al la oficejo de UEA. Baldaŭ poste mi ricevis la jarlibron, sed nur kondiĉe, ke mi redonu al tiu doganejo la al mi senditan konfiskoprotokolon. Car mi hazarde tiam ekkusis en malsanulejo en Magdeburgo, mia edzino eĉ devis porti la protokolon al tiu oficejo. »*

A.- Ni estas certaj, ke iom post iom tiuj doganaj malhelpoj malaperos, sed tre verŝajne energia rezistado, kiel tiu, kiun ni ĵus raportis, rapidigas tiun pozitivan evoluon.

Cl.- Ankoraŭ en Germanio orienta ni salutas sinjoron Helmer Kock en Schwarzheide, kiu ŝatas niajn priesperantajn kulturajn prelegojn.

A.- En Hispanio ni salutas sinjoron Nicolas Apaolaza Esnaola en Villafranca de Ordizia, sinjoron Juan Vives en Barcelona. De li ni ricevis leteron al Pola Radio en koverto por Svisa Radio. Verŝajne Pola Radio ricevis nian leteron. Ankaŭ tiel efektiviĝas interradiaj rilatoj !

Cl.- Ĉiam en Hispanio ni salutas sinjorinon Maria Pedra en Moiz apud Barcelona kaj la elsendojn Radio Sabadell, kiu komencis regule dissendadi Esperanto-programon la merkredon kaj jaŭdon vespere.

A.- En Hungario ni salutas sinjoron Bernard Golden en Veszprém, sinjorinon Anna Csapó en Békés kaj sinjoron Lajos Niederfriniger en Budapeŝto, juna ombrelisto kaj tapiŝisto, nekutima profesio, ĉu ne ! Li multe vojaĝas kaj tamen aŭskultas niajn prelegojn helpe de portebla radio-ricevilo. Li salutis nin okaze de la TEJO-kongreso en Varsovio kaj de Esperanto-tendaro ĉe Balaton-lago.

Cl.- En Islando ni salutas gesinjorojn Lovisa Oslasdalir kaj Haugremus Lonronkson en Gardahr. Ilia poŝtkarto kun akvofalo estas invito al migrado en ilia insulego.

A.- En Italio ni salutas sinjoron Giuseppe Munarini en Padova, sinjoron Gaspare Brachi en Sondrio kaj en Massa la Esperanto-Grupon kaj la 2-an kaj 3-an klasojn de la ŝtata lernejo V. Afieri, kie esperanto estas instruata.

Cl.- En Jugoslavio ni salutas sinjoron Svetanka Tubić en Ŝid kaj sinjoron Ivo Greb en Vela Luka.

A.- En Malto sinjoro Reno Camana en Orpheus proponas aŭdigon de kantoj, kiujn li mem komponis.

Cl.- Same pri kantoj skribis sinjoro Eugene Raveloson en Tananarive, insulo Madagaskaro. Li informiĝis pri la svisa himno.

A.- Fakte Svislando ne havas oficialigitan nacian himnon. Dum multaj jaroj Svislando uzis la melodion de la brita himno *Godsave the King*, al kiu ĝi adaptis parolojn, tio en la kvar lingvoj de la svisa federacio. Tiu himno komenciĝis per la vortoj : *Ho, sendependaj montoj*.

Cl.- Tiu uzo de la melodio de la brita himno kondukis al miskomprenoj okaze de la intemaciaj kaj olimpikaj kunvenoj. Pro tio Svislando nun uzas alian melodion kun aliaj paroloj ankaŭ kantataj en la kvar lingvoj de la svisa federacio. La unua strofo komenciĝas tiel: *Sur niaj montoj, kiam la suno anoncas brilan vekiĝon*.

A.- Ambaŭ himnoj neniam estis unuanime akceptitaj de ĉiuj svisoj kiel nacia himno. Cetere eĉ ne ekzistas svisa nacio, nur svisa federacio.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andree Gacond. Ĝis reaŭdo!